

KATOLIKA SENTO

Periodico dell'Unione Esperantista Cattolica Italiana (UECI)

www.ueci.it

"Per la promozione della fratellanza e della comprensione tra i vari popoli di diverse lingue" (Paolo VI)

Periodico bimestrale - Reg. trib. di Vercelli 22.12.1997 n. 306 -
Sped. in abb.post. art. 2 comma 20/c L662/96 - filiale di Vercelli -
Direttore resp.: Mons. Gianni Ambrosio - Dir. e amm.: Vercelli, via Benadir, 62
stampato da **arena.net** - Grisignano di Zocco (VI)

Anno 93 - n. 4
LUGLIO - AGOSTO 2014

PRINTEMPA KUNVENO

Vicenza (Casa del sacro Cuore) – 17-18 de Majo 2014

Dum la tria semajfino de Majo okazis en Vicenza la *Printempa Kunveno*, anstataŭ la 28a Kongreso de UECI. Partoprenis kvardeko da homoj.

Sabaton, tuj post la tagmanĝo, kaj antaŭ la oficiala malfermo, sinjoro Galdino Pendin prezentis la urbon Vicenza, per mallonga rakonto de ĝia historio, ekde la pra-historio ĝis la nunaj tagoj, kaj interesan priskribon de ĝiaj ĉefaj vidindaĵoj. Sekvis la oficiala malfermo de la kunveno fare de la prezidanto de UECI, kiu dankis sinjoron Pendin pro lia

prezentado, bonvenigis la kunvenintojn kaj prezentis la programon de la kunveno kun ĝiaj du temoj: *"Evangelii Gaudium"* kaj *"Esperanto dum EXPO 2015"*. Por ne enuigi la aŭskultantojn la du temoj enviciĝis alterne kun kelkaj paŭzoj kaj rozario antaŭ la vespermanĝo. Vespere estis la eblecon eliri por profiti de la *Nokto de la Muzeoj* okazanta tiun nokton en Vicenza. Dimanĉon estis la asembleo de UECI, la S.-kta Meso kaj, post la tagmanĝo, la prezentado de la ĉijara Ekumena Esperanto-kongreso en Trento.



Grupo de partoprenintoj en la Printempa Kunveno ĉe la ĝardeno de la kongresejo.

Printempa kunveno 2014

EVANGELII GAUDIUM

– enkonduka parolo de Giovanni Daminelli –

Riassunto: *Non si tratta di un'enciclica, ma di una "Esortazione apostolica" ispirata dal documento finale della 13a Assemblea ordinaria generale del Sinodo dei Vescovi conclusosi nell'ottobre 2012 sul tema "La nuova evangelizzazione per la trasmissione della fede cristiana". In essa viene sviluppato il tema della riforma della Chiesa in uscita missionaria, che è compito di tutti i fedeli. In particolare insiste sull'inclusione sociale dei poveri, la pace e il dialogo sociale e dà consigli pratici sulla preparazione non solo spirituale e religiosa, ma anche comunicativa degli operatori pastorali.*


Evangelii Gaudium (la ĝojo de la Evangelio) ne estas encikliko, sed simpla alvoko, adresata al ĉiuj. Fakte la plena titolo estas:

Francisko

Evangelii Gaudium

apostola alvoko
al la episkopoj
al la pastroj kaj al la diakonoj,
al la konsekritaj homoj
kaj al la laikaj fideluloj
pri la anonco de la Evangelio
en la nuntempa mondo.

Jes, en la nuntempa mondo! Ĉar en la nova jarcento la mondo ŝanĝiĝis. La homoj kaj la informoj rapide moviĝas tra la tuta mondo. (Kiam mi estis knabo, kaj lernigis al mi la odon de Manzoni "5 maggio" verkita okaze de la forpaso de Napoleono okazinta la 5an de Majo 1821, mi imagis la aŭtoro la 6an de Majo ĉe la skribotablo verkanta sian odon. Tute ne. Oni devis atendi pli ol unu monato antaŭ la alveno de la sciigo en Eŭropo kaj li ricevis la informon nur la 16 de Julio). Nuntempe grava novaĵo disvastigas en la tuta mondo en kelkaj minutoj; per aviadilo oni povas rapide trairi la mondon; per interreto oni povas havi kaj doni rapide informojn pri ĉio ajn; la robotoj



anstataŭas la manlaboristojn. Do necesas konformigi la anoncon de la Evangelion al la nova situacio. Ankaŭ se la Evangelio ne ŝanĝiĝas, la Eklezio devas trovi novajn modojn per anonci ĝin.

En la enkonduko de sia alvoko papo Francisko rimarkigas sep temojn:

- a) La reformo de la Eklezio en misia eliro.
- b) La tentoj de la paŝtistaj operacioj.
- c) La Eklezio kiel la tuto de la dia popolo evangelizanta.
- d) La homilio kaj ĝia preparado.
- e) La socia enirigo de la malriĉuloj.
- f) La paco kaj la socia dialogo.
- g) La spiritalaj motivoj por la misia sindevigo.

De kie li prenis la inspiron?

Fakte, petis ĉi tiun alvokon la episkopoj: En Oktobro 2012 okazis la 13a ordinara ĝenerala kunsido de la Sinodo de la episkopoj, kies temo estis: “La nova evangelizado por la transdono de la kristana fido”. En la unua prepozicio de la fina raporto de tiu kunsido, la episkopoj petis la papon eldoni dokumenton pri la temo. Pro tio ĉi tiu verko, ne donas nur la penson de la papo sed ankaŭ tiun de la tuta episkoparo.

(Laŭ la reguloj de la sinodo la fina dokumento, en latina lingvo, estas sekreta ĉar adresita al la papo. Benedikto la 16.a, post kelkaj monatoj demisiis, pro tio li ne povis eldoni la petitan verkon, tamen konsentis, ke estu diskonigata ĝian ne-oficialan tradukon en la angla*).

La alvoko de papo Francisko, adresita al ĉiuj, estas, laŭ lia stilo, simpla kaj profunda. Estas interese trarigardi la liston de la citaĵoj, por konstati, kiel la papo alveninta de la alia parto de la mondo, alrigardas la tutan mondon. Krom, la prepozicioj de la supredirita sinoda kunsido, la aŭtoro plej citata estas Johano Paŭlo la 2a, precipe pri la encikliko “*Ut unum sint*”, la alvoko “*Christifideles laici*”, “*Novo millennio ineunte*”, “*Redemptoris missio*” kaj la alvoko okaze de liaj vojaĝoj: *Ecclesiam in Africa*, *Ecclesiam in America*, *Ecclesiam in Asia*, *Ecclesiam in Oceania*.

Alia aŭtoro ofte citata estas Benedikto la 16a kaj Paŭlo la 6.a precipe pri lia alvoko *Evangelii nuntiandi*, sed ankaŭ por la enci-

klikoj *Ecclesiam suam* kaj *Populorum Progressio*, kaj ankaŭ Johano la 23.a pri lia parolado por la inaŭguro de la koncilio.

Li citis ankaŭ la dokumentoj de la naciaj Episkopaj konferencoj (Nordameriko, Brazilo, Kongo, Filipinoj, Francio, Hindujo, Usono, Latina Ameriko), kaj precipe la dokumenton de Aparecida (2007).

Kompreneble estas cititaj pluraj dokumentoj de la Koncilio, precipe *Lumen gentium*, kaj aliaj dokumentoj kiel la *Kompendio de la socia doktrino de la Eklezio*.

Kompreneble ne mankas bibliaj citaĵoj, sed ankaŭ de malnovoj aŭtoroj, kiel el *Summa theologiae* de sankta Tomaso.

Unuavide, lia priksidero, ne koncernas nur la du pulmojn de Eŭropo, sed la tutan mondon kiel indas al papa dokumento.

La alvoko estas dividita en unu enkonduko kaj kvin ĉapitroj:

– La ĝojo de la Evangelio.

1. La misia transformiĝo de la Eklezio.
2. En la krizo de la komunuma sindevigo.
3. La anonco de la Evangelio.
4. La socia dimensio de la Evangelizado.
5. Evangelizantoj kun spirito.

Ne estas celo de nia kunveno analizi ĉiujn ĉapitrojn – interalie mankus la tempo – pro tio mi elektis tri ĉapitrojn: la unuan, en kiu estas montrataj la bazaj celoj de la misia agado, la trian en kiu estas donataj praktikajn indikojn por la anonco kaj la kvaran, en kiu estas proponataj la engaĝiĝojn de la Eklezio rilate al la paco kaj justeco, la socia kuntrenado de la malriĉuloj, la interreligia dialogo, kun aparta atento al la ekumena dialogo. Ĉi lasta estas por ni precipe grava pro la ekumena inklinado de nia asocio, kiu estas preparanta la ekuman kongreson en Trento, en kiu vi ĉiuj estas varme invitataj partopreni kaj kunlabori.

*) vidu: http://www.vatican.va/news_services/press/sinodo/documents/bollettino_25_xiii-ordinaria-2012/02_inglese/b33_02.html



PAŜOJ AL LA UNUIGŔO

Jerusalemo – Sankta Tombo – 25a de Majo 2014
Papo Francisko kaj la Ekumena Patriarko Bartolomeo

Riassunto: *A cinquant'anni dallo storico abbraccio tra Paolo VI e Athenagoras a Gerusalemme, si è rinnovato nel medesimo luogo l'incontro tra il vescovo di Roma, Francesco, e il patriarca di Costantinopoli, Bartolomeo I, in una celebrazione ecumenica presso il Santo Sepolcro. I discorsi di saluto pronunciati prima dal Patriarca e poi dal Papa pongono in evidenza la comune aspirazione alla piena comunione superando le esitazioni ereditata dal passato.*

Post kvindek jaroj de la historia brakumo inter Paŭlo la 6a kaj Athenagoras en Jerusalemo la 5an de Januaro 1964, denove renkontiĝis la 25an de Majo 2014, la episkopo de Romo, Francisko, kun la ekumena patriarko de Konstantinopolo, Bartolomeo I. Ili renkontiĝis dum ekumena celebrazio ĉe la Sankta Tombo. Partoprenis ĉiuj eklezioj ĉeestantaj en la Sankta Lando: katolikoj, grek-ortodoksoj, armenoj, siriakoj, koptoj, abisenoj kaj aliaj kristanaj konfesioj.

La salutparolo de Bartolomeo ĉerpis la inspiron de la Tombo de Jesuo, kiu estis antaŭ ili. La unua mesaĝo el la malplena tombo estas, ke nia “lasta malamiko”, la morto, estas venkita de la amo de Kristo, pro tio, ĉiu morto pro la amo fariĝas vivo, vera vivo. La dua mesaĝo estas, ke la historio ne povas esti planita, ĉar la lasta vorto en la historio apartenas al Dio. Senutile oni metis gardistojn kaj grandan ŝtonon antaŭ la enirejo de la tombo. Ĉiu ajn klopodo de la homoj por plani sian estontecon sen Dio estas vana. Tria mesaĝo de la malplena tombo invitas nin ne timi la aliulon, la homon de alia religio aŭ konfessio, raso aŭ deveno, sed ami la aliulon kun liaj diversecoj. La malamo portas al

la morto, dum la amo forigas la timon kaj kondukas al la vivo.

Sekvis la parolado de papo Francisko. Ankaŭ li, antaŭ la Sankta Tombo, ĉerpis inspiron por diri, ke ĉiu baptito en Kristo releviĝis spirite el tiu ĉi tiu tombo: Ni staru en devota primedito flanke de ĉi tiu tombo por malkovri nian kristanan vokiĝon, ni ne lasu, ke oni forrabu la fundamenton de nia espero. Ekzistas ankoraŭ disiĝoj inter ni, disĉiploj de Kristo, kaj ĉi tiu loko rimarkigas plej suferi la dramon. Tamen kvindek jarojn post la renkontiĝo de la du venerindaj patroj, ni miregas, kiel laŭ la impulso de la Sankta Spirito, eblis tiom gravaj paŝoj al la unueco. Ni ne forgesu la multajn kristanojn persekutitajn pro ilia fido. Kiam kristanoj de malsamaj konfesioj troviĝas suferantaj kune, unu flanke de alia, kaj helpante unu la alian en frata karitato, tie estiĝas la ekumenismo de la sufero precipe efika por la tuta Eklezio. Ni flanken metu niajn hezitojn hereditajn el la pasinteco, malfermu nian koron al la ago de la Sankta Spirito, por kune paŝi al retrovita plena komuneco subtenataj de la preĝo, kiun de Jesuo mem faris al la Patro, en ĉi tiu urbo: «Ke ili estu unu ... por ke la mondo kedu».



MALFERMITAJ AL LA TUTA MONDO

Rubriko zorge de frato Pierluigi Svaldi

ONORARE SEMPRE

Purtroppo ci sono dei momenti nei quali siamo come costretti a distruggere, fino a sprecare il cibo e l'acqua. Nell'impegno di favorire una buona convivenza sociale ci succede addirittura di mandare a quel paese delle persone che si dovrebbero accogliere e apprezzare. A volte capita anche a noi di mettere a repentaglio la parte più intima della nostra esperienza nel tentativo di ottenere qualche risultato ritenuto importante: durante una sfida, per vincere un primato, come manifestazione di forza, ...

L'esperienza straordinaria del popolo d'Israele, miracolosamente liberato dalla schiavitù egiziana, proibiva severamente di sminuire la relazione con il Dio liberatore. Il comandamento numero due recita infatti: *«Non pronuncerai invano il nome del Signore, tuo Dio, perché il Signore non lascia impunito chi pronuncia il suo nome invano»* (Es 20,7). In altre parole è molto importante tenere sempre alta la considerazione di colui che ci ha permesso il tenore attuale di vita. Sminuire questa relazione, o addirittura snobbarla, è cadere nella povertà estrema, nel vuoto della personalità umana.

Perfino nella nostra vita sociale ci proibiamo severamente di sottovalutare l'ordine del comandante in tempo di guerra o di dittatura, ci si accorda di tenere alta la considerazione verso il responsabile delle operazioni in casi di emergenza o di pericolo, si cura la venerazione della persona amata

HONORI ĈIAM

Bedaŭrinde estas momentoj, en kiuj ni estas kvazaŭ devigataj detrui, ĝis forĵeti la nutraĵon kaj la akvon. En la sindevigo apogi bonan socian kunvivadon, okazas, eĉ al ni, sendi al la diablo personojn, kiujn oni devus akcepti kaj apreci. Fojfoje okazas ankaŭ al ni endanĝerigi la plej intiman parton de nia sperto klopodante obteni ian rezulton konsideritan grava: dum defio, por venki rekordon, kiel manifestado de forto, ...

La eksterordinara sperto de la popolo de Israelo, mirakle liberigita de la egipta sklaveco, severe malpermesis malpliigi la rilaton kun la liberiganta Dio. La ordono numero du efektive recitas: *«Ne misuzu la nomon de la Sinjoro, via Dio, ĉar la Sinjoro ne lasos senpuna tiun, kiu malhonoras lian nomon»* (Eliro 20, 7). Alivorte estas tre grava afero teni ĉiam alta la prikonsideron de tiu, kiu permesis al ni la nuntempan vivnivelon. Malplikonsideri tiun ĉi rilaton, aŭ eĉ bagateligi ĝin, estas kiel fali en ekstreman malriĉecon, en la vakuon de la homa personeco.

Eĉ en nia socia vivo ni severe malpermesas al ni subtaksi la ordonon de la ĉefo en tempoj de batalo aŭ diktaturo, ni interkonsentas teni alta la prikonsideron al la respondeculo de la operacioj en aferoj de urĝa bezono aŭ danĝero, ni prizorgas la respekton de la amata persono,

quando l'esperienza d'amore o di amicizia diventano interessanti.

Il comandamento ci mette sull'attenti a non sprecare la relazione con Dio fino a svuotarla, a non accostarsi in modo superficiale alla realtà interiore, disperdendo la motivazione di fondo di ogni iniziativa e attività. Ridurre Dio a una parola qualunque è il rischio che mette a repentaglio la nostra personalità, togliendo energia alla nostra esistenza. Senza un partner eccezionale non si cresce né dentro, né fuori. E questo vale per ogni nostra relazione umana, sociale e spirituale. Soprattutto nel campo dello spirito tutto è importante e niente va preso alla leggera; dobbiamo curare e coltivare il rispetto massimo verso il luogo dell'Assoluto, verso l'Attesa più grande, verso l'Altro da noi.

Un brano del Vangelo ce lo ricorda con un ammonimento: «*Non chiunque mi dice: "Signore, Signore", entrerà nel regno dei cieli, ma colui che fa la volontà del Padre mio che è nei cieli*» (Mt 7,21). Non è tanto importante apparire religiosi, o amici, o collaboratori di Dio, quanto piuttosto risultare personalmente coinvolti fino a impegnare il proprio tempo, le proprie energie e perfino la propria vita per Dio e per il suo progetto su questo mondo.

Il comando di «*non pronunciare invano il nome di Dio*» pone il limite estremo oltre il quale tutto crolla. Dare poco valore all'oggetto del proprio impegno significa farsi del male. Sottovalutare l'importanza di studiare e di propagandare la lingua internazionale esperanto ci porta a vanificare l'esperienza liberante vissuta nella reciproca immediata comprensione universale. Da questa raccomandazione nasce l'invito di non accostarsi all'esperanto per semplice gioco, o per vanità.

kiam la spertoj de amo aŭ amikeco iĝas interesaj.

La ordono atentigas nin ne malŝpari la rilaton kun Dio ĝis ĝia vakiĝo, kaj ne alproksimiĝi supraĵe al la interna realo, disperdante la bazan kialon de ĉiuj iniciato kaj agado. Redukti Dion al ajna vorto estas la risko, kiu endanĝerigas nian personecon, forprenante energion el nia ekzistado. Sen eksterordinara partnero oni ne altiĝas interne nek ekstere. Kaj tio ĉi validas pri ĉiaj niaj rilatoj homa, socia kaj spirita. Precipe en la spirita sfero ĉio estas grava, kaj nenio estas supraĵe prenenda; ni devas prizorgi kaj kulturi la plej grandan respekton pri la loko de la Absoluto, pri la plej granda Atendo, pri la Aliulo de ni.

Evangelia frazo memorigas tion al ni per admono: «*Ne ĉiu, kiu diras al mi: "Sinjoro, Sinjoro", eniros en la regnon de la ĉielo, sed nur tiuj, kiuj plenumas la volon de mia Patro, kiu estas en la ĉielo*» (Mat 7, 21). Ne tiom gravas, ke ni ŝajnas religiaj, aŭ amikaj, aŭ kunlaborantoj de Dio, kiom, prefere, ke ni persone mantriĝas implikitaj ĝis engaĝi nian tempon, niajn energiojn kaj eĉ nian vivon por Dio kaj por lia projekto pri tiu ĉi mondo.

La ordono pri «*ne nomu Dion vane*» starigas la ekstreman limon, trans kiu ĉio ruiniĝas. Malmulte valorigi la objekton de sia sindevigo signifas fari malbonon al si mem. Subtaksi la gravecon studi kaj propagandi la internacian lingvon Esperanton igas nuligas la liberigantan sperton travivitan en la senpera universala interkompreno. El ĉi tiu rekomendo naskiĝas la alvoko ne alproksimiĝi al la Esperanto nur ŝerce, aŭ vanteme.

Dirite inter ni ...



039

LA ĜARDENO

- Rozo!?!
 - Kion vi volas?
 - Kie vi estas?
 - En la ĝardeno, kompreneble.
 - Kial, kompreneble?
 - Ĉu vi ne scias?
 - Ne, mi ne scias.
 - Ĉu mi estas aŭ mi ne estas Rozo?
 - Vi ĉiam ŝercadas.
 - De vi, mi lernis.
 - Nu, se vi estas en la ĝardeno, kion vi faras?
 - Mi zorgas pri la plantoj .
 - Ĉu pri ĉiuj plantoj aŭ nur pri ... Rozo?
- Pri ĉiuj plantoj, memkompreneble.
 - Ĉu vi deprenis la sekiĝintajn foliojn?
 - Certe.
 - Ĉu vi ankaŭ deprenis la forvelkintajn florojn?
 - Ankaŭ tiujn mi deprenis.
 - Nu, vi bone faris.
 - Vi scias, ke mi volas, ke la ĝardeno estu ĉiam en ordo.
 - Jes, ĉar kiam venas viaj amikinoj, vi ricevas de ili nur laŭdojn.
 - Kaj ĉu tio ne kontentigas vin?
 - Mi povus ankaŭ diri, ke mi estas kontenta, sed dubo restas en mi.
 - Ĉu vere?
 - Jes.
 - Kaj kio estas via dubo?
 - Mi ne scias, ĉu vi amas la plantoj.
 - Jes, ja, mi amas la plantojn.

IL GIARDINO

- Rosa!?!
 - Che vuoi?
 - Dove sei?
 - Nel giardino, naturalmente.
 - Perché, naturalmente?
 - Non lo sai?
 - No, non lo so.
 - Sono o non sono Rosa?
 - Scherzi sempre.
 - Ho imparato da te.
 - Bene, se sei in giardino, che cosa fai?
- Mi prendo cura delle piante.
 - Di tutte le piante o solamente di ... Rosa?
 - Di tutte le piante, naturalmente.
 - Hai tolto le foglie secche?
 - Certamente.
 - Hai anche tolto i fiori appassiti?
- Anche quelli, li ho tolti.
 - Bene, hai fatto bene.
 - Lo sai che voglio che il giardino sia sempre in ordine.
 - Sì, perché quando vengono le tue amiche, ricevi da loro solamente lodi.
 - E ciò non ti soddisfa?
 - Potrei anche dire che sono contento, ma un dubbio rimane in me.
 - Davvero?
 - Sì.
 - E qual è il tuo dubbio?
 - Non so se ami le piante.
 - Sì, certo, amo le piante.

- Sed estas io alia, kio pli multe instigas vin zorgi pri la ĝardeno.
- Tio estas?
- La envienio de la amikinoj.
- Vi estas malbona.
- Ĉu ne estas vere?
- Nu, ni diru, ke mi estas iom vanterna.
- Sekve, mi pravas.
- Povas esti. Sed mi amas ĉiujn plantojn
- Kion tio signifas?
- Tio signifas, ke mi volas, ke ankaŭ miaj amikinoj zorgu pri siaj plantoj.

- Vi estas ruzulino.
- Mi nur amas la plantoj.
- Nu, se vi amas la plantojn, donu al ili akvon.
- Tio ne estas necesa.
- Kial?
- Ĉu vi ne vidas?
- Kion?
- La ĵurnalon.
- Kion havas la ĵurnalo?
- Ĝi skribas pri la vetero.
- Ĉiun tagon ĝi skribas pri la vetero .
- Jes, sed ne ĉiun tagon ĝi diras, ke posttagmeze falos pluvo tre taŭga por la ĝardenaj plantoj .
- Kaj ĉu vi kredas en la priveteraj antaŭvidoj?
- Kial, ĉu vi ne kredas?
- Ne, mi ne.
- Mi devas konfesi, ke ankaŭ mi ne ĉiam kredas je ili.
- Kaj do?
- Nu ĉi tiun fojon, mi estas certa, ke pluvos.
- Kial?
- Ĉar, ĉiamaniere mi ŝparas miajn fortojn!

- Ma c'è qualcos'altro che ti spinge di più a curarti del giardino.
- Cioè?
- L'invidia delle amiche.
- Sei cattivo.
- Non è vero?
- Beh, diciamo che mi vanto un po'.
- Di conseguenza: ho ragione.
- Può darsi. Ma io amo tutte le piante.
- Questo cosa significa?
- Questo significa che voglio che anche le mie amiche si curino delle loro piante.
- Sei una furbona.
- Amo soltanto le piante.
- Bene, se ami le piante, da loro l'acqua.
- Non è necessario.
- Perché?
- Non vedi?
- Che cosa?
- Il giornale.
- Cos'ha il giornale?
- Scrive del tempo.
- Tutti i giorni scrive del tempo.
- Sì, ma non dice ogni giorno, che nel pomeriggio cadrà una pioggia molto adatta alle piante da giardino .
- E credi nelle previsioni del tempo?

- Perché, tu non ci credi?
- No, io no.
- Devo confessare che anch'io non sempre ci credo.
- E dunque?
- Ebbene, questa volta sono certa che pioverà.
- Perché?
- Perché così risparmio le mie forze !



LABORISTOJ

- Cezaro!?!
 - Karlo!
 - Ĉu vi estas tie?
 - Jes.
 - Ĉu vi estas preta?
 - Jes, mi pretas.
 - Supren!
 - Bone.
 - Atentu!
 - Kio okazas?
 - La fenestro.
 - Kiu fenestro?
 - Tiu de la dua etaĝo.
 - Kaj do?
 - Oni malfermis ĝin.
 - Akcidente al ili.
 - Oni malfermis ĝin neatendite.
 - Ĉu okazis io?
 - Ne, nenio okazis, sed ni riskis.
- Bonŝance okazis nenio.
 - Sed oni devas ĉiam atenti.
 - Vi pravas: pro tio mi observas ĉiujn sekureco-normojn.
 - Ankaŭ mi.
 - Ĉu vi vidas?
 - Kion?
 - Mi metis la kaskedon.
 - Ankaŭ mi, kompreneble.
 - Ĉu ĉio estas en ordo?
 - Jes, se vi havas la ŝnuron kun la sekurec-ligaĵoj.
 - Mi havas ĝin.
 - Nu, ni iru malrapide.
 - Jes, direktu min, ĉar mi ne vidas.
 - Konsentite.
 - Ĉu mi iru?
 - Jes, malrapide.
 - Ĉu bone?



LAVORATORI

- Cesare!?!
 - Carlo!
 - Sei là?
 - Sì.
 - Sei pronto?
 - Sì, sono pronto.
 - Su!
 - Bene.
 - Attento!
 - Che succede?
 - La finestra.
 - Che finestra?
 - Quella del secondo piano.
 - Dunque?
 - L'hanno aperta.
 - Accidenti a loro.
 - L'hanno aperta improvvisamente.
 - È successo qualcosa?
 - No, non è successo niente, ma abbiamo rischiato.
 - Per fortuna non è successo nulla.
 - Ma si deve sempre far attenzione.
 - Hai ragione: per questo osservo tutte le norme di sicurezza.
 - Anch'io.
 - Vedi?
 - Che cosa?
 - Ho messo il caschetto.
 - Anch'io, naturalmente.
 - È tutto in ordine?
 - Sì, se hai la corda con gli imbragamenti di sicurezza.
 - Ce l'ho.
 - Bene, andiamo adagio.
 - Sì, guidami, perché non vedo.
 - D'accordo.
 - Devo andare?
 - Sì, adagio.
 - Bene?



- Jes, ankoraŭ iomete.
- Jen.
- Tiel.
- Ĉu ankoraŭ?
- Ne, atendu momenton: estas iom da vento.
- Ankaŭ la vento!
- Nu, kuraĝon: iomete supren.
- Ĉu tiom?
- Ne, haltu!
- Farite.
- Nun, revenu iom malsupren.
- Ĉu sufiĉe?
- Ne, ankoraŭ iomete.
- Jen!
- Haltu!
- Kaj nun?
- Nun, iru iom supren.
- Jen.
- Bone.
- Jen ankoraŭ.
- Perfekte.
- Ĉu mi tiru supren?
- Jes, ĉar ni superis la obstaklon de la fenestro.
- Jen, mi estas supre.
- Bonŝance ni rimarkis, ke oni malfermis la fenestron.
- Bonŝance.
- Nun enprenu la tutan keston.
- Jes, mi ĝin malplenigos.
- Jes, sed memoru resendi ĝin malsupren kun la dokumentoj, kiuj estas en la bretoj, dekstre.
- Kompreneble, tion oni jam diris al mi.
- Kiu diris tion al vi?
- La ĉefo, kompreneble.
- Kaj oni devas fari tion, kion la ĉefo diras.
- Jes.
- He, la ĉefo estas la ĉefo!
- Sì, ancora un pochino.
- Ecco.
- Così.
- Ancora?
- No, aspetta un momento: c'è un po' di vento.
- Anche il vento!
- Bene, coraggio, un po' in su.
- Così?
- No, fermati!
- Fatto.
- Ora vieni un po' in giù.
- È abbastanza?
- No, ancora un pochino.
- Ecco!
- Fermati !
- Ed ora?
- Ora vai un po' in su.
- Ecco.
- Bene.
- Ecco ancora.
- Perfetto.
- Devo tirar su?
- Sì, perché abbiamo superato l'ostacolo della finestra.
- Ecco, sono su.
- Per fortuna abbiamo notato che avevano aperto la finestra.
- Per fortuna.
- Ora prendi dentro tutta la cesta.
- Sì, la svuoterò.
- Sì, ma ricordati di rispedirla sotto con i documenti che sono negli scaffali, a destra.
- Naturalmente: me l'avevano già detto.
- Chi te l'ha detto?
- Il capo, naturalmente.
- E si deve fare ciò che dice il capo.
- Sì.
- Eh, il capo è il capo.

Nia eta Parnaso

Rubrica dedicata alla Poesia

Rubriko dediĉita al Poezio

PER LA VIA DEL MARE

SURVOJE AL LA MARO

*Lungo la strada che ci porta al mare
se n'incontra di chiese e di chiesine!*

*La strada corre per campi e villaggi
sfiorando cimiteri e cappellette
dove qualche devoto si inginocchia
dopo d'avere acceso un lumicino
sopra una tomba o innanzi a una Madonna.*

*Prega - chi sa! - per qualche suo defunto,
per gente che ha vissuto o ancora vive
i triboli e i dolori d'ogni giorno.
Forse - chi sa! - all'Eterno raccomanda
anche la gente che si reca al mare.*

*Lungo la strada che conduce al mare
ce ne sono di cippi e di chiesine!
Hanno muri segnati da gelate
e tetti scuri con su ciuffi d'erba
ma dentro sempre c'è un lumino acceso.*

*Preter kiom da kirkoj kaj kirketoj
survoje al la maro ni veturas!*

*La voj' trakuras kamparajn vilaĝojn
tombejojn ektuŝante kaj kapelojn
kie kelka piulo genuiĝas
ekfairiginte vaksan lumigilon
ĉe tomba ŝton' aŭ antaŭ Madonbildo.*

*Li preĝas eble por sia mortinto,
por hom' vivinta aŭ nun travivanta
la ĉiutagajn plagojn kaj suferojn.
Eble li preĝas al la Eternulo
eĉ por la veturantoj al la maro.*

*Apud la vojo maren kondukanta
kiomaj cipoj kaj preĝejoj estas!
Sed tiuj muroj markitaj de frostoj
kun herbotufoj sur grizaj tegmentoj
ĉiam entenas lumeton fajrantan.*

Pur essendo stato rifinito nel 1998, il testo risale a moltissimi anni prima, durante uno dei miei viaggi dalla Lombardia al Veneto, quando ancora non c'erano le cosiddette superstrade e il viaggiare, benché più lento e faticoso di oggi, poteva ancora dirsi "a misura d'uomo".

Eĉ se polurita en 1998, la teksto estis verkita antaŭ multegajn jarojn, dum unu el miaj vojaĝoj de Lombardio al Veneto, kiam ankoraŭ ne estis la tiel nomataj aŭtoŝoseoj, kaj la veturado, kvankam pli malrapida kaj laciga ol hodiaŭ, povis ankoraŭ estis difinita "laŭ homa mezuro".

(Gianni Andreotti 1998)

(esperantigis G. Daminelli)

LA KVAR BIBLIAJ TAGOJ

Tuchoměřice: 30a de Aprilo – 3a de Majo 2014



En Prago: Francino, Norma kaj Felice

De la 30a de Aprilo ĝis la 4a de Majo 2014 okazis la jara kunveno de “La kvar Bibliaj Tagoj” en Tuchoměřice, nordokcidenta parto de la urbo Prago (Ĉeka Respubliko). Gastigis nin antikva kastelo, eksmonaĥejo, nun sidejo de la ekumena franca komunumo “*Chemin neuf*” (nova vojo). Kun mi partoprenis aliaj du italoj: Felice Sorosina el Bergamo kaj Francesca Trussardo el Vicenza. Kompreneble, pro la distanco

inter niaj loĝejaj urboj, la komenco de nia kunvojaĝo estas iom komplika, sed finfine, kvankam sub daŭra pluveto, post sukcesa kuniĝo, ni ekforiras de Trento, trairas Innsbruck, Salzburg, Linz, Pisek, kaj, post iom da problemoj ni atingas la kunvenejon, je malfrua nokto, kiam ĉiuj kunvenantoj jam de longe endormiĝis.

La sekvan matenon, la unuan de Majo, ni kuniĝas kun la aliaj – proksimume 40 partoprenantoj alvenintaj de pluraj eŭropaj landoj. Post la matenmanĝo kaj la Meso, en la preĝejo de la Kastelo, la cisterciacia monako, patro Willibald Kunigk komencas sian prelegon pri la letero de Sankta Paŭlo al la Galatoj. Post mallonga paŭzo matenmeze, li daŭrigas sian prelegadon ĝis tagmezo. Post la tagmanĝo oni ekveturas al Prago por la unua vizito de la urbo. Bonŝance estas belega tago, serena kaj varmeta, kiu invitas al agrabla promenado tra la urbo. Ni vizitas la preĝejon de Sankta Maria de la Venko (en la kvartalo *Malà Strana*) en kiu troviĝas la fama statueto de la “Infano Jesuo de Prago”. Poste oni promenas laŭ la longa ponto Karolo, sur la rivero Moldava, flankita de multenombraj imponaj marmoraj statuoj. Oni pluiras pene pro la intensa trafiko de la festa tago, inter bruanta amaso de turistoj ĉiulingve babilantaj kaj hazardaj fotistoj, kiuj malhelpas la trairejon. Sub la ponto interkruĉiĝas multenombraj ŝipetoj, ŝarĝitaj de festantoj. Nur pene nia grupo, iom parte disigita, atingas la vastan malnovan placon de la urbo kaj haltas mirigi-

ta antaŭ la mondkonata turo de la mekanika horloĝo, kiu, ek de la jaro 1410, ravas la pasantojn. Ĉi-tie, areto de niaj grupanoj disiĝas por sin adresi al la Kapelo de Bet-Leĥemo, dum la restantoj preferas atendi, ke la horloĝo skandu la ekzaktan horon kondiĉe ke ties ĉarma mekanismo funkcii. Multego da scivolemuloj amasiĝas tie sube, kaj nia grupeto tute dissolviĝas. Mi kaj Francesca restas izolitaj ne sciante kion fari por solvi la neatenditan situacion. Ni vagadas tra la granda placo serĉante inter la homamaso konatan vizaĝon, sed vane. Ni plurfoje telefonas al niaj gekunuloj, sed sen ajna respondo. Lacaj kaj maltrankvilaj ni sidiĝas sur ŝtonbenkon kaj – miraklo! – ni aŭdas paroli itale! Paro da italaj geknaboj el Bari (Apulio) sidas ĉe ni, kaj subita interkonversacio deturnas nin de nia problemo. Finfine ni sukcesas ekrimarki tra la homamaso du el niaj kunkongresanoj, ili mem izolitaj kiel ni. Feliĉe, unu estas el la Ĉeĥa Respubliko kaj bone konanto de nia komplika revena itinero, kaj ni kune povas rapide atingi la kastelon.

La duan de Majo patro Willibald daŭrigas sian prelegon ĝis la tagmanĝo. Post-tagmeze, per urba buso, ni atingas la preĝejon de Sanktaj Cirilo kaj Metodjo por la Meso. Dume, ekstere, subite enrompas fortega pluvego kun hajlado, kiu, tamen mildiĝas, kiam ni, post la mesfino, eliras

por reveni al nia kunvenejo.

Post vespermanĝo iuj geknaboj de la komunumo “*Chemin neuf*”, kiu gastigas nin, restas kun ni por paroli pri siaj ĉiutagaj travivo kaj agado.

Sabate, la trian de Majo, frumatene alvenas juna luterana pastoro, Wolfram Rohloff, kiu okupas nin dum la tuta mateno per interesa prelego pri la letero de Sankta Paŭlo al la Efezanoj. Post la tagmanĝo ni reveturas al Prago por viziti la katedralon de Sankta Vito, mirinda ĉefverko de arkitektura kaj skulptura artoj. Bedaŭrinde la vetero estas malbona: forta vento kaj intensa malvarmo malpermesas al ni promeni por viziti aliajn lokojn kaj, male, devigas nin rehejmiĝi plej baldaŭe. Post la vespermanĝo pastoro Rohloff invitas nin al Diservo, tio estas al “la luterana vespermanĝo”, kiun partoprenas nia tuta grupo: katolikoj kaj protestantoj. Fine la pastoro adiaŭas nin dirante: “Ĝis revido en Trento”. Fakte li partoprenos la venontan ekumenan kongreson en Trento kune kun la edzino kaj du filinetoj.

La sekvan tagon, dimanĉon, post la Meso en la preĝejo de la kastelo, ekas la foriroj de la kunvenintoj. Tagmanĝas cetera tre eta grupo. Ni tri foriras kiel lastaj kun belega memoro de nia mallonga restado en Prago.

(Norma Cescotti)

GIOVANI CONCORRETE

L'UECI dispone ancora di n° 3 premi da 258,23 € ciascuno da assegnare a giovani di età compresa tra i 18 e 30 anni, iscritti all'UECI che conseguano il diploma di esperanto di terzo grado. I premi saranno erogati quale contributo per la partecipazione a un congresso dell'UECI o dell'IKUE. Gli interessati si rivolgano al presidente UECI

Verbale dell'Assemblea UECI 2014

Domenica 18 maggio 2014 alle ore 09:30 presso la "Casa del Sacro Cuore" di Vicenza, nell'ambito del *Printempa kunveno* si è svolta l'assemblea generale ordinaria degli associati dell'Unione Esperantista Cattolica Italiana per discutere e deliberare sul seguente ordine del giorno:

1. Elezione degli organi operativi dell'assemblea (segretario e scrutatori)
2. Lettura e approvazione verbale dell'assemblea precedente
3. Relazione morale e finanziaria 2013
4. Votazione per l'approvazione delle relazioni morale e finanziaria
5. Bilancio preventivo 2015
6. Programma di attività 2015
7. Varie ed eventuali.

Erano presenti 19 soci + 5 deleghe. Per l'approvazione delle relazioni morale e finanziaria sono pervenute 10 votazioni per posta.

1. Sono stati scelti: come segretario Tiziana Fossati, come scrutatori Giovanni Gazzola e Francesco Ottino.
2. Il presidente dà lettura del verbale dell'assemblea 2013 che viene approvato all'unanimità.
3. Il presidente dà lettura delle relazioni morale e finanziaria, già riportate da Katolika Sento n. 2/2014.
4. Le relazioni morale e finanziaria sono approvata all'unanimità.
5. Il presidente Daminelli fa presente che si fa un bilancio preventivo in vista di un aumento delle quote di iscrizione. A questo scopo informa che la Tipografia Saviolo, che stampava Katolika Sento, maggiore fonte di spesa, ha cessato l'attività, perciò si è dovuto trovare un'altra soluzione. Si è passati alla stampa digitale che ha un costo decisamente inferiore e non esige un numero di copie superiori al necessario. Tra l'altro consente la stampa a colori a prezzi contenuti. Anche se si devono aggiungere le spese di trasporto e per imbustare la rivista, i costi rimangono tuttavia inferiori. In considerazione di tale risparmio, il presidente propone di non aumentare la quota di iscrizione. La proposta viene approvata all'unanimità.

6. Il presidente espone una situazione relativa al bonfarado. Qualche mese fa gli ha scritto Hans Bakker che si è interessato dell'*afrika agado* dell'UEA. Questi riferisce della situazione di Augustin Kokozwa, un ragazzo di Goma, esperantista, studente in medicina che veniva aiutato finanziariamente da don Duilio e che ora, per mancanza di finanziamenti, è costretto a interrompere gli studi e chiede se possiamo aiutarlo. Il presidente ha scritto a questo giovane per avere precisazioni in proposito. Questi risponde che don Duilio aiutava altre tre studentesse di cui, una si è diplomata ragioniera e le altre due si sono ritirate dagli studi, mentre lui finora è riuscito a continuare grazie qualche piccolo contributo di Alexis (colui che si occupa degli orfani di Goma). Si apre la discussione sui problemi del "bonfarado". Alcuni riferiscono delle loro esperienze, spesso non positive, quando hanno aiutato esperantisti dell'Africa. Non è possibile controllare la veridicità delle affermazioni di coloro che chiedono aiuto e trovare persone affidabili sul luogo che possano controllare l'uso corretto del denaro inviato. Qualcuno propone di appoggiarsi al Cer-es, che però, per precedenti esperienze negative, ha rinunciato ad aiutare Goma. Il presidente propone un aiuto a fronte di una documentazione delle spese e degli esami superati. Qualcuno fa presente che la documentazione potrebbe non essere veritiera. Alla fine non si giunge ad alcuna conclusione.

7. Boschin fa notare che non vengono assegnati i tre premi di 258,23 € (500000 lire) messi a disposizione dall'UECI per i giovani che conseguono il diploma di terzo grado. Daminelli fa rilevare che nessuno richiede tale premio, malgrado questo sia ripetutamente reclamizzato su Katolika Sento. Boschin propone di aumentare il premio a 300 euro. Vista la perplessità dell'assemblea, Serio Boschin si dichiara disposto a elargire di tasca sua i 50 euro di aumento del premio. Daminelli chiede alla segretaria di mettere a verbale la promessa di Boschin.

Non essendoci altro da decidere l'assemblea si conclude alle ore 11.30.

Vicenza 18-5-2014 – Tiziana Fossati

NI FUNEBRAS KAJ KONDOLENCAS

Sabato 24 maggio 2014 ci ha lasciati all'età di 82 anni **Lucia Rando ved. Pesavento**. La sua personalità particolarmente sensibile ed aperta l'ha portata ad aderire con entusiasmo al movimento esperantista e ad aprirsi al mondo con i numerosi viaggi all'estero e con l'ospitalità nella sua casa di Montecchio Precalcino (VI) dove spesso accoglieva esperantisti da tutto il mondo avendo aderito al servizio del *Pasporta Servo*.

Ricordiamo la sua presenza cordiale e discreta nei congressi UECI sempre affettuosamente accompagnata dalla figlia Sylvie a cui porgiamo le più sentite condoglianze.

Ricordiamola nelle nostre preghiere.



NORME E QUOTE ASSOCIATIVE PER L'ANNO 2014

Associato ordinario <i>con Katolika Sento</i> (SO)	22,00 €
Associato giovane <i>con Katolika Sento</i> (SG)	11,00 €
Associato familiare <i>senza Katolika Sento</i> (SF)	11,00 €
Associato ordinario <i>con Espero Katolika</i> (SOE)	43,00 €
Associato sostenitore <i>senza Katolika Sento</i> (SS)	43,00 €
Associato sostenitore <i>con Espero Katolika</i> (SSE)	86,00 €
Solo abbonamento a <i>Katolika Sento</i> (AK)	10,00 €
Solo abbonamento a <i>Espero Katolika</i> (AE)	21,00 €

È associato giovane chi non ha superato i 25 anni. È associato familiare chi convive con altro associato. Specificare nella causale del versamento la categoria dell'associato, l'anno di nascita dei giovani, l'esatto indirizzo per il recapito del periodico K.S., la destinazione di eventuali offerte.

I versamenti vanno fatti sul C.C. Postale n. 47127675 *Unione Esperantista Cattolica Italiana U.E.C.I* codice IBAN: IT66 R076 0101 6000 0004 7127 675 Codice BIC/SWIFT: BPPIITRRXXX

Nota: Sull'etichetta/indirizzo con la quale avete ricevuto questa copia di *Katolika Sento* è indicata la sigla associativa e l'anno di scadenza dell'abbonamento.

COMITATO CENTRALE U.E.C.I.

Presidente: Giovanni DAMINELLI, via Lombardia 37, 20099 Sesto S.Giovanni (MI) – tel. 02.2621149 – katolika.sento@ueci.it (la residenza del presidente è anche sede dell'associazione)

Vice presidente: fra Pierluigi SVALDI, Belvedere San Francesco 1, 38122 Trento – tel. 0461.230392

Segretario/cassiere: Marco POLITI, Via Montemartini 4, 20139 Milano – tel. 02.5395237

Consulente culturale-religioso: Ida BOSSI, Viale Faenza, 26/7 20142 Milano

Responsabile dei congressi: Giovanni CONTI, via F.Filzi 51, 20032 Cormanico (MI) – tel. 02.66301958

Responsabile culturale: Norma COVELLI CESCOTTI, via E.Fermi 29, 38100 Trento – tel. 0461.925210

Consulente informatico: Tiziana FOSSATI, via F.Filzi 30/A, 20035 Lissone (MB) - tel. 039.464942

Consulente editoriale: Carlo SARANDREA, Via di Porta Fabbrica 15, 00165 Roma – tel. 06.39638129

Assistente Ecclesiastico: mons. Giovanni BALCONI, p.zza Duomo, 16, 20122 Milano

Nota bene: Tutte le comunicazioni alla redazione di *Katolika Sento* vanno spedite al presidente UECI.

AMUZE

Ĉiuj ajn rajtas kontribui sendante al ni siajn humoraĵojn, kondiĉe ke ili estu en Esperanto.



(el www.gioba.it - sendis Tiziana Fossati)

La papo en Jerusalemo

Dum la lasta vizito de papo Francisko en la Sankta Lando, li ricevis judon, kiu petis de li aŭdiencon:

- Vidu, via Moŝto, mi heredis mian restoracion de mia patro, kiu heredis ĝin de sia patro, kiu heredis ĝin de sia patro, kiu heredis ĝin de sia patro, kiu...
- Haltu momenton! ... ĉu vi volas atingi la tempon de Jesuo Kristo?
- Ĝuste tion! ... Temas pri la Lasta Vespermanĝo: ĝi ankoraŭ ne estas pagita.

Trankvileco

Kuracisto vizitante pacienton diras al lia edzino:

- Sinjorino, via edzo bezonas trankvilecon, pro tio mi preskribas ĉi tiun trankviligilon.
- Bone, mi prenigos ĝin al li.
- Ne, sinjorino, la trankviligilo estas por vi.

Maljunuloj

Maljunaj geedzoj, vizitas alian maljunan geedzan paron por vespermanĝi kune. Dum la du edzinoj preparas la tablon la viroj interbabilas iomete:

- Jocjo, mi aliĝis al kurso por plibonigi mian memorkapablon.
- Ho bonege! Kien vi iras?
- Mi iras ... ehm ..., kiel nomiĝas tiu floro kun la dornoj?
- Rozo.
- Dankon! Rozo, he Rozo! kie estas la kurso, kiun mi vizitas?

Frenezuleco

Ministro pri sano vizitas frenezulejon kaj pridemandas la direktoron:

- Kiel vi rekonas, ĉu iu estas vere freneza?
- Unue ni plenigas bankuvon, poste ni donas al li kuleron, tason kaj sitelon kaj petas lin malplenigi la kuvon.

- Ha, mi komprenas: normala homo uzas la sitelon.
- Ne! normala homo depresas la ŝtopilon!

(sendis Marco Politi)

Lernejen

Frumatene patrino eniras la ĉambron de la filo:

- Ellitiĝu dormemulo, vi devas iri al la lernejo.
- Mi ne volas iri al la lernejo.
- Vi devas iri.
- Mi malamas tiun lernejon. La knaboj estas stultaj kaj kruelaj.
- Vi tamen devas iri.
- Tie estas kiel ĝangalo, unu batalo post la alia. Ili minacas min ĉiutage.
- Vi deves iri!
- Kial mi devegas!
- Ĉar vi estas la lernejestro.

En stacidomo

Sinjoro eniras kurante en fervojan stacidomon kaj demandas fervojiston:

- Se mi kuras, ĉu mi sukcesos trafi la trajnon al Venecio?
- Dependas de kiom rapide vi kuras, la trajno startis antaŭ dek minutoj.

http://www.ueci.it/k_sento/ks_2014/

